

l'esperanto

revuo de itala esperanto-federacio

Anno 31 - Numero 1

24 gennaio 2000

Questa rivista viene inviata in omaggio a tutti gli europarlamentari italiani, per tenerli costantemente informati sul problema della comunicazione in Europa, sulle attività del movimento per la lingua internazionale esperanto e sulle proposte da questo presentate. A tale scopo è particolarmente dedicata la rubrica "L'Europa e la Lingua".



*A Ostenda avrà luogo
il 4° Congresso Esperantista dell'Unione Europea*

27-4 / 1-5-2000

L'ESPERANTO

Organo della FEI - Federazione Esperantista Italiana
Organo de IEF - Itala Esperanto-Federacio

Ente Morale con D.P.R. 28-6-56 n. 1720

Direttore responsabile/ Leĝe respondeca direktoro:
Umberto BROCCATELLI

Redattore / *Redaktoro*: Umberto BROCCATELLI
Via G. Brodolini 10, I-00139 Roma - Tel. 06.87.13.50.19
(anche fax, previo avviso telefonico / *riceveblas ankaŭ
faksoj, sed necesas telefona antaŭanonco*). Posta
elettronica / *e-poŝto*: u.broccatelli@tiscalinet.it /
u.broccatelli@libero.it

Corredattore / *Kunredaktoro*: Carlo SARANDREA
Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 Roma - Tel.-fax 06.63.28.39

Amministrazione / *Administrejo*

Fei - Via Villoresi, 38 - I-20143 Milano - Tel./fax
02.58.10.08.57 - c/c post. / *pĉk* 37312204

Banca (*bankkonto*): Banco Ambrosiano Veneto, Milano
0002, Cod. ABI 03001, CAB 01602, n. conto 36255-62
Conto UEA / *UEA-konto*: *ief*-p
Internet: <http://www.esperanto.it>

Comitato esecutivo della Fei / *Plenuma komitato de Ief*

Giordano FORMIZZI, presidente / *prezidanto*
Renato CORSETTI, vice-presidente / *vicprezidanto*
Gustavo BONVECCHIATO, segr. gen./ *ĝen. sekretario*
Gianfranco POLERANI, cassiere / *kasisto*
Laura BRAZZABENI, insegnamento / *instruado*
Pierluigi CINQUANTINI, congressi / *kongresoj*
Fabrizio PAGLIAROLI, informazione / *informado*

Pubblicazione riservata agli Associati

Quote associative 2000:	Lire	Euro
Associato ordinario	50.000	25,82
Associato sostenitore	150.000	77,46
Associato garante	500.000	258,20
Associato fino a 25 anni	25.000	12,91
Associato familiare	25.000	12,91

Tutte le quote, tranne quella di Associato familiare, danno diritto a ricevere la rivista.

Agli Associati sostenitori sarà inviato in omaggio un libro; agli Associati garanti è offerta l'iscrizione gratuita al Congresso nazionale.

Le iscrizioni si ricevono presso i Gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione Fei.

La IEJ (Itala Esperantista Junularo - Gioventù Esperantista Italiana) è la sezione giovanile della Fei. Ne fanno parte gli Associati fino all'età di 30 anni. A cura della IEJ sono redatte le pagine di *Nova Sento* all'interno della rivista.

Registrazione al Tribunale di Milano n. 85 del 27 febbraio 1970

Stampa: Elettrongraf - Via Dina Galli, 5 - 00139 Roma
Tel. 06.87.13.62.64

In copertina: Ostenda, sede del 4° Congresso Europeo di Esperanto

Anno 31 - N.1

24 gennaio 2000

Anche il giorno di Natale 1999 il Santo Padre ha ripetuto i Suoi Auguri per televisione anche in Esperanto, con le parole:

**“DIBENITAN KRISTNASKON
KAJ PROSPERAN NOVJARON”**

La jarmil-fina jaro

La novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA malfermas tiun ĉi numeron, la unuan de la jaro kun la iom “magia” nombro kun tri nuloj, per apartaj bondeziroj kaj esperoj. Laŭ liaj vortoj, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj la fojaj senkuraĝiĝoj, ni plu laboru, kun konfido kaj kun realismo, por savi kaj antaŭenigi la ideon pri neŭtrala lingvo. Kiam mi estis junulo, kun fresaj memoroj pri la katastrofa milito, mi havis du grandajn idealojn antaŭ mi: Eŭropa Unuiĝo kaj Esperanto. Ambaŭ estis ofte mokataj de skeptikuloj. Tamen la unua el tiuj du celoj, kvankam ankoraŭ ne atingita, multe pli proksimiĝis kaj ĝi aspektas kiel baldaŭ atingebla.

Altiero Spinelli, la granda batalanto por Eŭropa Unuiĝo, al kiu mi parolis pri Esperanto, respondis al mi «Mi laboras por konstruo de Eŭropo: se mi sukcesos, vi esperantistoj semu en mian sulkon». Tio estas ja nia tasko.

Ankaŭ pri tio oni parolos en Ostendo, fine de aprilo (vidu p. 13)

La paĝoj de *L'Europa e la lingua*, prezentas proponon pri agado serioza en tiu kampo. Kaj atentinda estas ankaŭ la recenzo pri libro de Claude Hagège pri kunligita temo.

La kutimaj rubrikoj kaj diversaj informoj donas kromajn plurajn legindaĵojn.

Denove plej korajn bondezirojn al ĉiuj niaj legantoj!

U. Br.

Siamo molto rattristati di dover informare i nostri lettori che il signor **Cesare Pozzuoli**, titolare della *Elettrongraf*, che per tanti anni ha curato impeccabilmente la stampa della nostra rivista, è deceduto il 31 dicembre scorso. Alla signora Liberata e al figlio Walter esprimiamo le nostre più sentite condoglianze.

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

La simbolo kaj emocio grava jaro 2000, ĉesojla al nova miljaro, donas al multaj homoj - signife pli ol aliaj jarkomencoj - emon kontempli la pasintecon, same kiel la estontecon. Cedante al la sama emo je tiu ĉi historia fojo, mi kaptu la okazon paroli - mi esperas, ne tro filozofie - pri kelkaj aspektoj de nia movado, de nia komunumo kaj de UEA mem, laŭ miaj observoj kaj spertoj dum mia ĝisnuna tempo kiel prezidanto de UEA.

Je la fino de la 20-a jarcento, eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento, kies konjunkturoj certe ne helpis prosperi ideojn similajn al la nia.

Ni ofte aŭdas akuzajn demandojn: kial ni ne atingis pli? kial la entuziasmo kaj optimismo de niaj pioniroj plejparte velkis? Sed mi respondas per demando: ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis? Se ni rigardas al nia historio, la honesta respondo devas esti: ne; atendi pli estis utopie kaj tro optimisme.

Tamen, mi forte kredas ke ni rajtas eniri la novan jarmilon optimisme kaj kuraĝe, eble ne kun la espero atingi la samajn celojn, almenaŭ ne sammaniere kiel volis la pioniroj, ĉar iliaj celoj probable ne plu aktualas en la nuna mondo, tiom malsama al la ilia. Frontas nin, nuntempajn esperantistojn, tute alia mondsituacio. Konforme al ĝi, ankaŭ ni mem, niaj organizoj, niaj sintenoj kaj strukturoj devos ŝanĝiĝi. Fakte, en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo ĉiuj organizoj kiuj volas ĝin iel servi, devas konstante sin reformi.

Ne konvenas en novjara mesaĝo profunde trakti pri tio kiaj politikaj, taktikaj aŭ strategiaj ŝanĝoj estas dezirindaj, ekzemple, por UEA. Laŭlonge de la jaro, mi klopodos stimuleme fari kelkajn publikajn sugestojn. Konsekvencajn kritikojn kaj ideojn de ĉiuj interesatoj mi bonvenigas.

Tamen, mallonge kaj esence: kiajn problemojn de tiu speco mi vidas? Fundamente gravas la fakto ke dum la lastaj jaroj la ĝenerala publiko, precipe gejunuloj, ne multe interesiĝas pri Esperanto. Tio rezultas de la ĉiuhora inundo de tiel nomataj novaĵoj kaj komercocelaj allogaj distraĵoj kiujn la nuntempa publiko tutmonde konstante spertas, kun sinteno ofte priskribita kiel apatio. Esperanto de longe ne kvalifikiĝas kiel inda novaĵo, kaj certe ne kiel komerca logaĵo. Nia idealismo en la moderna mondo klare ne plu sufiĉas sola.

Ni ankaŭ devas kalkuli kun tio ke la antaŭjuĝoj kaj skeptiko de multaj elituloj kontraŭ ni daŭre restos.

Malgraŭ ĉio tio, nia unika Esperanta kultura vivo daŭre pliriĉiĝas kaj kvalite plialtiĝas. Nur unu ekzemplo: konstante eldoniĝas literaturaj verkoj altkvalitaj, tradukitaj kaj originale verkitaj.

Por progresigi nian aferon, ĉiu sin demandas: kion ni faru? Mia unua kaj plej ĝenerala sugesto estas ke ni strebu plifortigi nian internacian senton de kohereco, sed ne en spirito sekteca, maltolerema aŭ ofenda al aliaj, ĉu esperantistoj aŭ ne.

Due, por socia asocio kiu volas agi efike, ege gravas, evidente, la propra strukturo. Strukture UEA, same kiel ĉiuj internaciaj organizoj, havas multajn problemojn jam pro la fakto mem ke ĝi laboras internacie. La komitatanoj kaj estraranoj de UEA, kvankam statute ili havas la superan gvidrolon en la aferoj de UEA, necese impresas pli malfortaj kaj iom pli amatoraj ol la profesiuloj en la Centra Oficejo, ĉar la unuaj laboras en sia libertempo, dise tra la mondo. Tia kontraŭdira situacio kreas seriozajn problemojn - kiel en ajna asocio celanta agi kaj efike kaj demokratie - pri la kombino de efika gvidado kun efektivaj, ĝustaj, demokratiaj principoj de respondec. Bedaŭrinde, akcepteblajn solvojn ne facilas trovi.

Trie, ni devas akcepti ke, kvankam la interpopola lingva problemo mondscale ege gravas, ĝi plejparte ne interesas la ordinarajn homojn.

Do, ree: kion fari?

Mi sugestas ke, daŭre disvastigante la uzon de Esperanto per niaj tradiciaj metodoj, ni pliaktiviĝu en aliaj statute permesitaj aferoj, ekzemple, batalante por homaj rajtoj ĝenerale.

Kvankam pri certaj temoj ligas nin statute deviga neŭtraleco, la statuto permesas al ni, fakte eĉ kuraĝigas nin, tion fari. En niaj tiukampaj klopodoj, ni strebu malpligrandigi la distancon inter la "skoloj" por- kaj peresperantaj de nia tuta movado kaj komunumo, kaj pli alproksimiĝi al la peresperanta flanko.

Sendepende de la demando de neŭtraleco, decidi pri la plej bonaj, saĝaj kaj prudentaj reagoj al multaj dornaj demandoj ĉiam restos problemo. Mi kredas ke, post pli ol cent jaroj, ni jam estas sufiĉe maturaj fari taŭgajn decidojn.

Ni ĉiuj ankaŭ iĝu pli toleremaj al la multaj diferencaj opinioj kaj tendencoj en ĉiuj vicoj de nia komunumo, kaj ni atente aŭskultu niajn kritikistojn.

UEA ne estas, kaj ne volas esti, la fonto de ĉiuj saĝoj pri la plej bonaj manieroj progresigi Esperanton kaj, pere de Esperanto, helpi la bonstaton de la mondo. Inkluzivemo, akceptemo, toleremo al ĉiuj fluoj de opinioj estu nia devizo.

Geomikoj, mi ne intencas prediki al vi. Fiere, memfide kaj ĉiatendence, ni marŝu antaŭen.

Mi deziras ke ĉiuj havu feliĉan novan jaron.

(interredaktore)

Kep Enderby

La Seminario por instruistoj en Modena

La Seminario por instruistoj de Esperanto organizita de FEI en Modena (4-5.12.99) allogis preskaŭ 60 partoprenantojn el dudeko da diversaj lokoj, inkluzive de foraj urboj kiel Torino, Udine, Trieste, Romo kaj Napoli.

Al instruistoj prelegis profesoroj Giordano Formizzi, Renato Corsetti kaj Laura Brazzabeni, "eksportindaj" italaj fakuloj pri pedagogiaj temoj. Formizzi komenieske parolis pri la graveco bone koni la subjekton en la lernado - la lernanton. Pri la specifajo kaj unikeco de la personeco de ĉiu opa lernanto kaj relativeco de ĝenerale starigitaj normoj, reguloj kaj leĝoj kiuj krude postulas ekz. iun kvanton de la scio en iu certa momento. Corsetti prezentis mallonge historion de lingvo-instruado ĝenerale kaj ĉefajn uzitajn metodojn, akcentis daŭran enigmecon de la proceso de lingvoakirado kaj substrekis gravecon de la motivoj por lerni. Precipe por instrui Esperanton motivigo estas ege grava, ĉar lernantoj malfacile vidas palpeblan, materian aŭ alian konkretan utilon de la studata lingvo. Laura Brazzabeni parolis pri la metodoj kaj instrumaterialo por lernado de Esperanto, do, pri la celo de instruado, karaktero de studobjekto kaj la materialo kaj, kompreneble, de la lernanto. Kun ŝia prelego la seminarianoj ricevis ankaŭ koncizan skribitan materialon pri la prezentita temo kaj, aparte, pri la instrumaterialo. En tiu foliaro ŝi analizis dudekon da lernolibroj, legolibroj, ekzercoj, korespondaj kursoj kaj vortaroj uzataj kaj uzablaj en Italio.

Kompreneble, seminarianoj povis starigi la demandojn al prelegantoj, interŝanĝi opiniojn, vidi diversajn novajn kaj malnovajn librojn, prezenti al aliaj la materialon kiun ili mem uzas, aĉeti novajn librojn ĉe deĵorinta libroservo de CoEdEs. (Freŝe el presejo rekte al la seminario venis "Manuale di esperanto - Secondo livello", de Renato Corsetti kaj Nino Vessella). Alessandro Dematheis prezentis la unuajn paĝojn kaj desegnaĵojn de la kompakta disko pri Esperanto kiun li preparas kun la helpo de kelkaj torinaj esperantistoj.

En laborgrupoj la seminarianoj pritraktis temojn de ĝisdatigaj kursoj de italaj instruistoj (neesperantaj), de esperantaj kursoj en superaj mezlernejoj pere de kiuj lernantoj povas akiri studkreditojn kaj de kutimaj esperantaj kursoj, trinivelaj.

Interalie la instruistoj proponis modernigon de la regularo de la Itala Instituto de Esperanto kiu ĝis nun baziĝas sur malnovaj dokumentoj. Estis prezentitaj problemoj pri la agnosko de la studkreditoj al lernantoj kiuj elektis kurson de Esperanto. Foje tiu agnoskado dependas de unu persono en la

lernejo kiu povas eĉ malaprobi ĉion. Sekve oni proponas ke al la lernantoj oni sendu atestilojn de la Itala E-Instituto kun akompana informmaterialo pri la lingvo kaj historio kiu helpu kaj al la lernanto prezenti gravecon de sia laboro kiu estas valorigata dum la abiturienta ekzameno kaj al la suspektemaj komisionanoj. Tiajn kursojn oni devas realigi ene de marto, por ke ene de majo la lernantoj povu prezenti la demandon pri la agnosko de la kurso.

Kadre de la ĝisdatigaj kursoj por italaj instruistoj (neesperantistoj) oni proponu 24-horajn ĝeneralajn kaj enkondukajn kursojn. Oni prezentu Esperanton kiel utilan ilon kiu kune kun interreto povas ebligi rapidajn kaj rektajn kontaktojn por interkulturaj projektoj kiujn la lernejoj pli kaj pli ofte entreprenas. Precipe por tio estas rekomendata projekto Interkulturo, t.e. virtuala lernejo "Tibor Sekelj". La partoprenantoj de la seminario kreis ankaŭ dokumenton nomitan Apelo de Modena kiu rekomendas fondon de Eŭropa Instituto de Esperanto cele de la pli bona disvastigo de la lingvo ene de la landoj kaj projektoj de Eŭropa Unio.

Viŝnja Branković

ANGOLO DELL'ISTITUTO

Il giorno 5 dicembre 1999 si sono tenute a Modena le elezioni per il nuovo consiglio direttivo, collegio dei revisori e collegio dei proviviri.

La maggior parte dei membri ha votato per lettera e la partecipazione è stata numerosa, tanto da far parecchio lavorare i membri della commissione elettorale (Anna Maria Faiella e Paola Gorini).

Per la prima volta l'Istituto Italiano di Esperanto ha adottato le votazioni per lettera e ha visto la partecipazione attiva di 85 membri su 154. Purtroppo di parecchi membri non si hanno più notizie e da tempo alcune cattedre non hanno più contatti con la direzione generale.

RISULTATI DELLE ELEZIONI:

Consiglio direttivo:

Fabrizio Pennacchiotti	voti 52
Laura Brazzabeni	voti 51
Elisabetta Vilisics Formaggio	voti 39
Romano Bolognesi	voti 29
Luisa Madella Oberrauch	voti 25
Glauco Corrado	voti 24

Collegio dei revisori:

Ermigi Rodari
Alessandro Amerio
Maria Teresa Campiani Boragini

Collegio dei proviviri:

Carlo Minnaja
Luigi Tadolini
Giordano Formizzi

Il giorno 18 dicembre 1999 il nuovo consiglio si è riunito a Milano con il Direttore Generale e ha nominato il presidente (Fabrizio Pennacchietti), il tesoriere (Romano Bolognesi). I compiti di segreteria saranno svolti dal direttore generale Carlo Bourlot, mentre la stesura dei verbali di consiglio e dei resoconti delle attività dell'Istituto saranno a carico di Laura Brazzabeni.

Il consiglio in questa seduta ha discusso della pubblicazione del 2° volume di "Ludu kun ni" di Elisabetta Vilisics Formaggio, testo che sarà edito dall'ERA; della formazione di un fondo in memoria del prof. Dino Fabris, con il quale sarà premiato ogni anno il miglior terzogradista; dell'organizzazione di un seminario in collaborazione con la FEI e la gioventù esperantista italiana in occasione del Festival Internazionale di Pasqua, che avrà luogo a Cavallino (Venezia).

Augurando a tutti i membri delle cattedre un proficuo 2000 e sperando che anche i membri meno attivi e le cattedre più silenziose si facciano sentire, saluto voi tutti

Laura Brazzabeni

KOMISIONO RENKONTIĜOJ

Se vi intencas organizi aranĝon en via urbo kaj ŝatus havi abundan partoprenon kaj plej grandan sukceson, bonvolu sekvi tiujn ĉi konsilojn:

- antaŭ la decido pri la dato, konsultu Edvige Tantin Ackermann - respondeculon pri la Komisiono, por eviti eventualajn koliziojn kun aliaj renkontiĝoj;
- post la decido informu ŝin pri la bazaj datenoj laŭ la formularo kiun vi ricevovos;
- sekve, tre volonte oni informos la italan esperantistaron pri la aranĝo, kiu aperos ankaŭ en kalendaro de tempo al tempo publikigita kaj disvastigita.

Jen la nuna listo de ĉi-jaraj aranĝoj:

27.02.2000 TRIESTE Semajno de Internacia Amikeco nored@tiscalinet.it

15.04.2000 BOLZANO Festo de Amikeco leafab@tin.it

29-25.04.2000 CAVALLINO (Venezia) 24a Internacia Junulara Festivalo (vidu *Nova Sento*)

26-30.08.2000 CASALECCHIO DI RENO 69a Itala Kongreso de Esperanto beg.Tellini1912@esperanto.nu

02.12.2000 BOLZANO La tago de Esperanto leafab@tin.it

17.12.2000 TRIESTE Zamenhofa Tago nored@tiscalinet.it

INTERVENTI DI PROTEZIONE CIVILE UNA PROPOSTA

PER MIGLIORARE L'OPERATIVITÀ

L'Associazione esperantista triestina ha inviato al Vice Presidente della Giunta regionale del Friuli - Venezia Giulia la seguente proposta, corredata da una copia della conferenza di Claude Piron tenutasi a Riva del Garda durante l'ultimo congresso italiano (pag. 4-12 de *l'esperanto*, 8/1999).

Preg.mo signore

dott. Paolo CIANI

Vice Presidente della Giunta Regionale del Friuli - Venezia Giulia - TRIESTE

Protezione civile senza confini

Mi riferisco alle notizie stampa relative al tema in oggetto, per offrire la nostra collaborazione.

In caso di catastrofi e calamità naturali, la prontezza ed efficacia dei soccorsi sono assolutamente determinanti e nel caso di interventi effettuati da personale della Protezione civile appartenenti a paesi di lingua diversa, il problema della comunicazione tra gli operatori assume una estrema importanza. Quando il tempo manca, una cattiva o tardiva interpretazione delle parole pronunciate può costare la vita a molti. Le allego il testo di una conferenza, illustrante il problema meglio di quanto possa farlo io, e sul quale mi permetto di chiedere una riflessione.

Nel protocollo d'intesa da Lei promosso in materia di protezione civile, Le chiedo di inserire anche un punto riguardante la concreta comunicazione tra gli operatori. Per quanto riguarda la nostra Regione, la mia Associazione si impegna a tenere, gratuitamente, dei corsi di lingua internazionale esperanto ad uso degli operatori, con le modalità che vorrà stabilire. E' ovvio che anche in paesi confinanti dovrebbero fare altrettanto, per i quali sono disponibile a trovare gli insegnanti adatti attraverso le associazioni esperantiste locali.

Le invio inoltre una nota sull'Associazione esperantista triestina per opportuna conoscenza.

RingraziandoLa per l'attenzione, resto in attesa di riscontro ed invio i migliori saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA

La Presidente (Edvige Ackermann)

Invito tutte le associazioni esperantiste di Piemonte, Liguria, Lombardia, Trentino-Alto Adige e Veneto a fare altrettanto con i loro Amministratori Regionali ed i responsabili della Protezione civile. In tutte le Regioni si potrebbe fare altrettanto, ma certamente quelle che si trovano ai confini, per ovvie ragioni, sono propriamente interessate.

(Edvige)

ESPERANTO POR KONTAKTO INTER INDIĜENAJ POPOLOJ

Kiu el vi povas senhezite diri la loĝlokon de la sekvaj popoloj: Tlingit, Ŝor, Mapuĉe, Brunka, Masai, Dajak, Lumbe, Papuoj, Majaaj?

Ja, ili vivas respektive en Alasko, Siberio, Ĉilio, Kostariko, Kenjo, Malajzio, Usono, Nov-Gvineo kaj Gvatemalo.

Temas pri indiĝenaj popoloj, kiuj internacie en nenia maniero povas aserti siajn rajtojn. Inter la nacioj por tiuj ne estas loko. En 1945 Unuiĝintaj Nacioj estis fonditaj, kies fonda akto sin apogas sur la nacio kiel jura persono kaj ne rekonas la diversecon de popoloj ene de unu lando.

En diversaj manieroj oni provas en la lastaj jaroj adaptiĝi al tiu diverseco. Tiel funkcias ekde 1995 la «Internacia Jardeko por la Indiĝenaj Popoloj» de Unuiĝintaj Nacioj. Kiam la Kostarikano José Carlos Morales, membrante la Konsultan Grupon de la Jardeko, antaŭ du jaroj renkontis la direktorinon de la nederlanda lingva institucio «Narwal», li deklaris, ke la plej granda problemo de lia popolo estas la komunikado eksteren. Tiu sugesto estis sufiĉa por la esperantula direktantaro de tiu institucio, kaj ili elpensis planon por rimedi la izolitecon de la indiĝenaj popoloj. Tiu izoliteco povas esti duobla: al la aŭtoritatoj de sia lando, ĉar ili ne sufiĉe regas la nacian lingvon, kaj al aliaj indiĝenaj popoloj en la mondo, ĉar tiuj uzas malsaman nacian lingvon.

Tamen granda nombro da indiĝenaj popoloj klopodas starigi internacian reton, kiu devas helpi haltigi la neniigajn procezojn. Ili konscias pri la fakto, ke pli intensa interŝanĝo de konoj kaj spertoj helpas al la disvastigado de kreivaj kaj efektivaj alternativoj. La malestado de komuna lingvo kaj la limigita aliŝo al modernaj komunikiloj grande malhelpas ilin.

La plano adoptis la nomon “Indiĝenaj dialogoj”. Ĝi enhavas por 1999 po du kursojn pri Esperanto por kontaktpersonoj de indiĝenpopolaj organizaĵoj.

La unua kurso kun dudek unu partoprenantoj okazis dum la unuaj tri semajnoj de septembro. Dum la unuaj du semajnoj ili estas trejnataj legi kaj skribi (la parolado estas nur kromcelo) Esperanton. Sed altkvalita komunikado pere de Esperanto ne sufiĉas! Por maksimume profiti la uzadon de Esperanto kontraŭ malaltaj kostoj la partoprenantoj ankaŭ devus lerni efektive utiligi retroŝton kaj fakson, enkonduki la utiligon de ambaŭ teĥnikoj ene de siaj organizaĵoj.

Do post du semajnoj, kiam la komunikado estas ebligita, la enteno de la instruado direktiĝis al la

regado de la komputilo kaj la aliŝo kaj uzado de Interreto.

La dua kurso okazis fine de novembro 1999.

La projektmaŝtoj intencas trejni 250 kontaktpersonojn antaŭ 2005. Ili esperas, ke dumtempe la Indiĝenaj Popoloj estos konstruitaj fortan kaj dinamikan retajon de proksimume ducent organizaĵoj, kiuj povas en Esperanto komuniki rapide. Per tio ili estos rompintaj sian izolecon. Sed la estrada vizio streĉiĝas plue: danke al sia virtuala interkultura indiĝena universitato ili devas lerni unu de la aliaj kiel ekzemple konservi sian lingvon, kiel kontroli la plenumadon de traktato, kiel protekti siajn intelektulajn rajtojn aŭ ekologian medion. Plue devos estis establita organizaĵo de la “Unuiĝintaj Indiĝenaj Nacioj”, kiu postulos komprenon kaj respekton por la rajtoj de la indiĝenaj popoloj.

Pli da informoj ĉe: “S. Lelarge”
<narwal@usa.net>

Katalin Szmidelius

El *ret-info* kun redaktaj ŝanĝoj

KATOLIKA ĈEĤA-SLOVAKA RENKONTIĜO

La 3a RENKONTIĜO de ĉeĥaj kaj slovakaj katolikaj esperantistoj okazos en la tagoj 18-20.8.2000 en Salesana Domo, Žilina, Slovakio. La renkontiĝo okazos sub la devizo: *Eklezio en la 3a jarmilo*. La organizanto estas la IKUE-grupo en Žilina. Al la renkontiĝo ni invitas ankaŭ kredantojn de aliaj konfesioj kaj nekredantojn. Bonvenaj estas alilandanoj.

El la programo: Komuna traktado, s-taj mesoj en Esperanto, busa ekskurso, prelegoj pri la temo: *Eklezio en la 3-a jarmilo*, amuza programo. Viajn prelegojn bonvolu proponi, la aliĝilojn kaj la partoprenkotizon bonvolu sendi al: Vladimír Němec, Zvolenská 5, SK-010 08 ŽILINA (Slovakio).

Partoprenkotizo (laŭ la dato de pago)

ĝis 30.4: 440 Sk (20.116 lirojn)

ĝis 30.6: 470 Sk (21.476 lirojn)

surloke: 500 Sk (22.850 lirojn)

inkluzivas 2 tranoktojn, nutradon de vendreda vespermanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo; busan ekskurson kaj organizaĵajn elspezojn. La aliĝintoj ricevos konfirmilon pri pago kaj pli detalajn informojn. Junuloj ĝis 25 jaroj pagas nur 300 Sk, resp. 350 Sk.

La unuan renkontiĝon antaŭ du jaroj en Žilina partoprenis pli ol 60 gefratoj el 4 landoj.

Informis: Vladimír Němec.

nemec@fstroj.utc.sk

LA SCHEDA DI ISCRIZIONE PER IL PROSSIMO FESTIVAL INTERNAZIONALE GIOVANILE!

EKSTERORDINARA IJF EN LA JARO 2000

Ankaŭ en la jaro 2000, dum la paska semajno, okazos en Italio la Internacia Junulara Festivalo. La preparlaboro bone progresas kaj eblas anonci ke la venontjara IJF estos multlilate eksterordinara:

✓ **Kunlaboro kun TEJO**

La IJF-on organizas Itala Esperantista Junularo kune kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo: do pli da spertoj - kaj pli da kvalito - ol iam ajn.

✓ **Subteno de EJF**

La Festivalon subtenas la Eŭropa Junulara Fondaĵo de la Konsilio de Eŭropo. Danke al tio, ni planas plenumi la sekvajn punktojn.

✓ **Festivalo kaj Seminario**

La IJF estos samtempe ankaŭ Seminario pri Eŭropa Integriĝo; se vi interesiĝas pri tio, vi povos partopreni altkvalitajn TEJO-stilajn programojn pri Eŭropo kaj lingvopolitiko.

✓ **Malaltaj kotizoj**

La kotizoj varias inter 52 kaj 170 eŭroj... Ĉu necesas diri pli?

✓ **Repago de vojaĝkostoj**

Ni povos parte repagi viajn vojaĝkostojn, ĉefe se vi venos karavane.



✓ **Riĉa programo**

Ni ofertas pli da muziko, pli da teatro, pli da kulturo kaj - danke al vi - pli da etoso!

✓ **Tute apud Venecio**

La IJF okazos dekon da kilometroj for de la plej alloga urbo en la mondo!

✓ **Pli internacia**

Pro ĉio ĉi ni havas konkretan esperon havi pli da partoprenantoj el pli da landoj ol kutime (dum la ĝisnunaj Festivaloj ni atingis respektive 200 kaj 20).

(ALIAJ) CENT DEK CENTDEKONOJ DA KULTURO

[Daŭras el la pasinta numero]

FG: La du fortoj iusence blokis la lingvon. Neniu vere gajnis ĝis nun, ĉar efektive la helpfunkcio enestas la lingvospiriton - t.e. la kulturo, la psika imago de la lingvo inter la parolantoj,

LINGVEJO, DOLĈA LINGVEJO la fono de la originalaj tekstoj, ktp. Por atingi la lastan ŝtupon de la naturiĝo - t.e. akiri lingvejon - oni devas plenumi parton de la helplingva funkcio. La dilemo jenas: por plenumi entute la helplingvan funkcion oni teorie devintus enkonduki E-on en ĉiuj lernejoj de la mondo sammomente ĉie ajn, kaj tio ne eblas eĉ en la plej naivaj revoj de la E-istoj. Pli konkrete, oni povas imagi rolon de la lingvo en iu parto de la mondo kie la lingvoj multas, kie la helpa funkcio povas utili, kaj plenumi parton de la naturiĝa lasta ŝtupo (akiri lingvejon). Eĉ pli konkrete, oni fokusas atenton je Eŭropa Unio pri tio, pro multaj kialoj, sed kaze de oficialiĝo en EU de E-o kiel ĉies eŭropana lingvo - ĝuste parta plenumo de la naturiĝo-procezo - oni devas rekoni ke E-o ne egalas por ĉiuj mondanoj: "E-istoj egalas sed eŭropanoj egalas pli ol aliaj".

NS: Ĉu tio estas la ĉefa konkludo de via verko?

FG: Mi ne scias ĉu tiu estas la ĉefa konkludo. Certe estas grava konkludo de esplor-vojo.

NS: Via esploro estas sociolingvika, kaj do - eĉ se vi esploris ĉefe pri E-o kaj ne pri la E-istaro - vi verŝajne ekhavis opinion pri nia komunumo/movado/parolantaro aŭ kiel vi preferas nomi ĝin...

FG: Jes ja, certe.

NS: Vidu la citaĵon de Jorge Camacho aperintan en la pasinta Nova Sento: "Ni estas kvar ranoj en marĉo, kvar ranoj kun nobla hobio. Tiusence oni povus pli trafe kompari nin kun sciencfikciuloj, kiuj, same kiel ni, eldonas librojn kaj revuojn, kongresas kaj seminarioj, korespondas, dediĉas sufiĉan atenton al trupo da diversnaciaj verkistoj kaj, fine, opinias sian okupon la plej grava en la mondo, amen. Amen". Vi estas E-isto kaj sciencfikciisto. Kion vi opinias pri ĝi?

FG: Mi jam legis ie tiun lian aserton. Temas pri metaforo kiu bone donas klarigon al la socilingvikaj faktoj, sed kiel ĉiu metaforo, ĝi simpligas la realon. La kerno de la nuanca diferenco inter sciencfikciuloj kaj E-istoj estas la rolo de la lingvo en ĉies ajn idento-difiniĝo. Ne egalas, profunde, psike, diri al si mem: "mi estas sciencfikciulo" kaj "mi estas E-isto", ĉar lingvo iras proksime al la kerno de ĉies ajn idento, kaj des pli lingvo kiu (a) estas elektita de la parolantoj (aŭ, kaze de denaskuloj, ne refuzata) kaj (b) multe similas al la lingvo de la beboj, al la spontana lingvo kiun ĉiu bebo lernas

nature, aŭ alivorte al la universala gramatiko de Chomsky. Tiu ne estas mia originala ideo, tion jam vidis Tèsniere antaŭe kaj Piron poste.

NS: Tre interese. Tio sugestas alian demandon (sed mi ne scias ĉu vi interesiĝas ankaŭ pri ĝi): kia homo (kutime) emas diri al si "mi estas E-isto"? ĉu inteligentulo, ĉu sentaŭgulo, ĉu psikmalsanulo?

FG: Kutime oni sin difinas E-isto kiam oni sufiĉe regas la lingvon. "Sufiĉe" signifas, kiam oni sentas sin komforta en ĝia uzo en la plejparto de la situacioj. Aliflanke, oni povas ne regi bone la lingvon tamen senti sin profunde engaĝita en la ideologio ligata al ĝi (substreke, la vorto "ideologio" ne havu flank-signifojn, nek pozitivajn nek mal-). En mia sperto - mi ne esploris sociologie l' aferon kiel indus - E-isto estas homo firme konscia pri la rilato inter lingvo kaj idento. Fakte, multfoje temas pri anoj de gepatraj lingvoj malfortaj, minoritataj aŭ minorigitaj, laŭ via prefero, aŭ gefiloj de gepatroj kies gepatraj lingvoj estas malsamaj, aŭ plie homoj tre interesiĝantaj pri lingvoj, ĉar ili konsideras la lingvon la plej grava veturilo de la homgrupa kaj homunueca identigila procezo. Preskaŭ ĉiuj estas homoj kiuj bone konscias pri la relativo de la koncepto de nacio. Ekzemple, la plejparto

NACIO - RELATIVA IO

de la italoj simple identigas italojn kun italarolantoj, ne konsiderante interalie la germanlingvaj sudtiroloj. Mia patrino venas de tiu regiono de Italio en kiu multaj enloĝantoj parolas la germanan kiel denaskan familian lingvon. Ĝis kiam oni loĝas enregione, ĉio bonas, tio agnoskatas; momente ke oni eliras, la mezkultura italo asertas tute certe: “se vi parolas denaske la germanan, vi estas germano”, ne konsiderante ke oni povas senti sin “germanlingva italo”; kaj krome ne konsiderante ke la germana ne estas privata havo de germanoj: ĉu oni kuraĝas aserti ke aŭstroj kaj svisoj ne estas germanaj parolantoj?!? Kaj temas nur pri ekzemplo. Bone, kaze de E-isto, eĉ la plej malklera, ŝi aŭ li neniam falus en tiel evidente malnuanca miso.

NS: Kaj ĉu ekzistas homspecoj kiujn ni ne sufiĉe atentigas kiam ni informas pri E-o, sed eble pli ol aliaj povus emi lerni ĝin?

FG: Tiu estas vere malfacila demando... kiel vidate, laŭ mi la grundo por la esperantisto - t.e. ebla E-isto en siaj kredoj kaj opinioj - estas tre profunda en la psiko, do malfacile rekonebla per sociolinguikaj instrumentoj. Tiu speciala “speco” ne evidentas, eliras de la persona historio de ĉiu. Ĝenerale, oni povas diri ke multaj E-istoj simple venas klaĉ-al-klaĉe: oni konas jam E-iston kiu klarigas siamaniere pri kio temas, oni entuziasmiĝas pro la entuziasmo de l’ aliulo, kaj alproksimiĝas. En multaj

homoj miarimarke ludas gravan rolon la ekzoteco de la lingvo, la fascino, la ĉarmo de la sekreto: malmultaj konas ĝin, do mi povas uzi ĝin por elitiĝi min. Mi ne ŝatas tro tiun pensmanieron, sed rekonindas ĝia ekzisto. Finfine, laŭ komunikista vidpunkto, por amasiĝi en komerca, merkataka socio kiel la okcidenta eŭrop-amerika, oni devas igi E-on moda afero. Sed la problemoj estas ke modoj venas kaj malvenas tre rapide, sed lerni lingvon kaj igi ĝin propraĵo ne estas tiel rapide kiel ŝanĝi la koloron de la vestaĵoj de sezono al alia!

NS: Kaj por fini ni revenu al io pli persona. Kion vi ĝuas en E-o nun? Kio igas ĝin via propraĵo? Kio sentigas vin E-isto, kaj ne nur lingvisto kiu esploris pri E-o?

FG: Eĉ ti malfacile... Mi emas respondi al vi tute sincere: nuntempe mi estas en turnopunkto de la vivo-tempo, ĉar mi finis studi, mi baldaŭ finos civilservi kaj poste mi ekkomencos laborserĉi kaj finfine labori. Tio signifas, praktike, ke la multego da aktiviĝoj nemongajnaj kiujn mi ĝuis ĝis nun devos limiĝi. Inter aliaj (ekz. mia rokgrupo, mia korusa aktiveco, go-ludo ktp.) granda parto kaj intereso estiĝas rilate al E-o, kiu bedaŭrinde malfacile iĝas mongajna okupo... Do, nun mi ĝuas nenion novan pri E-o: legado, malmulte da skribado (mi konsideras min verkemulo, tamen mi vivas nun verkeman haltperiodon, ne raraĵo inter verkemuloj) kaj zorgo pri la interretejo de mi kreita. Mi intencas fortikiĝi en la kono de la lingvo per la literaturo, kiun mi ne sufiĉe konas, kaj poste doni mian

kontribuon al la lingvo kaj al la literaturo per iu skribaĵo, ekz. semiotika aŭ komunikisma - nenu serioze skribis pri tiuj temoj... Efektive, kio kaŭzis al E-o iĝi propraĵo de mi ne estis tamen libreska afero, sed male tute homrilata afero: la kono de novaj homoj, la antaŭa “bona etoso”, tiu speciala flaro de internacieco kiun oni povas ĝui nur per E-o, laŭ mi... Mi intencas partopreni diversspecajn verdajn renkontiĝojn en la estonto, por pli bone sperti la etoson en diversaj E-istaj medioj...

NS: Kaj fine, ĉu io, de tempo al tempo, emigus vin kabei?

FG: Mi volas diri ion kio eble surprizos multajn legantojn. Mi esperas ke ĉiu E-isto de temp’ al tempo emas kabei:

tio laŭ mi estas bona indikilo de psika sano, ĉar tio signifas ke E-o ne konkeris tro grandan parton de la Memo (aŭ Ego, se vi heleneskemas), kaj tio signifas konsekvence ke oni kapablas ĝuste ne tro proksimiĝi al la afero: oni devas teni la eblecon al si vidi ĝin de sufiĉe malproksime por havi superrigardon pri la tuto kaj samtempe doni al si ŝancon vidi la specialerojn... samkiel antropologo, kiu partas en tribo por koni ĝin sed ne partas komplete en la tribo mem. Tre malfacila tasko, mi agnoskas tion. Sed, almenaŭ por mi, valoras la penon havi tiun konduktan horizonton. E-o estu en ĉies vivo, sed ne estu ĉio en ties vivo.

MI KABEMAS, DO MI ESTAS



tejo

tutmonda esperantista junulara organizo



itala esperantista junularo

INTERNACIA SEMINARIO PRI EŬROPA INTEGRIGŬ 24a INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO

Ĉu esti aŭ ne esti Eŭropano?

**Cavallino (Venezia), Italio
De la 19a ĝis la 25a de aprilo 2000**

Kio estas eŭropa kulturo? Ĉu ĝi ekzistas? Kiel rilatas unu al la alia la Eŭropo de Eŭropa Unio kaj la Eŭropo de la Konsilio de Eŭropo? Ĉu vi mem havas rolon en Eŭropo? Ĉu vi mem estas eŭropano, ekstereŭropano, mondĉivitano, vilaĝano... esperantisto?! La seminaria programo celas respondi tiajn ĉi demandojn.

La ĉi-jara IJF havas aldonan dimension: ĝin organizas ne nur IEJ sed ankaŭ TEJO, kaj ĝin subvencias la Eŭropa Junulara Fondaĵo de la Konsilio de Eŭropo. Do ni povas proponi pli bonajn kondiĉojn, kaj ni esperas havi pli multnaciajn partoprenantaron. Post la pasintjara sukcesego ni daŭrigos la kunlaboron kun la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, kiu okazigos studsesiojn, kaj ni aranĝos altkvalitan internacian E-kurson.

Kaj kompreneble ankaŭ ĉi-jare ni havos riĉajn distrankaj vesperan programojn, por doni amuzon por ĉies ŝatoj en varma esperanta-itala etoso!

Kiel alveni aŭte

Eliru la aŭtoŝoseon A4 (en San Donà di Piave se vi venas de Trieste, en Quarto d'Altino se vi venas de Venezia) kaj sekvu la indikojn por Jesolo. Apud Jesolo sekvu la indikojn por Punta Sabbioni. 500 metrojn post la kruciĝo ĉe Ca' Ballarin estas Via Radaelli (maldekstre).

Kiel alveni trajne

De Trieste prenu trajnon ĝis San Donà di Piave, poste buson ĝis Jesolo - Piazza Drago kaj de tie buson n-ro 5 (direkto Punta Sabbioni) kaj haltu en Via Radaelli. De Venezia Mestre prenu buson ĝis Jesolo - Piazza Drago kaj sekvu la suprajn instrukciojn.

Kiel alveni ŝipe

De Venezia prenu ŝipon al Punta Sabbioni kaj de tie buson n-ro 5 (direkto Jesolo) ĝis Via Radaelli.

Kotizoj

Estas 4 landokategorioj, faritaj laŭ la riĉeco kaj la distanco de Italio. La kotizoj estas en miloj da liroj (mil liroj estas iomete pli ol unu germana marko). La aliĝperiodoj estas:

- A Ĝis 31.01.2000
- B De 01.02 ĝis 31.03.2000
- C Poste / surloke

Kaze de partatempa restado, la kotizo de nememzorgantoj estas tiu de la aliĝperiodo C por iliaj lando- kaj aĝokategorio, dividita per 6 kaj obligita per la nombro de tranoktoj. Memzorgantoj pagas ĉiukaze la tuttempan kotizon.

Krompagoj kaj rabatoj

- Ĉiu kiu petos invitleteron (nepre antaŭ 28.02.2000) devos kontribui al niaj elspezoj per 5 000 ITL
- La italoj ne anoj de IEF/IEJ devos krompagi 50 000 ITL (eĉ por unu sola tago) aŭ aniĝi surloke
- Por 1- aŭ 2-persona ĉambro la krompago estas 10 000 ITL tage

Council of Europe
Conseil de l'Europe



Youth Directorate
Direction de la Jeunesse

**La aranĝo estas subtenata de la
Eŭropa Junulara Fondaĵo**

La ejo

La 24a IJF okazos en kongresvilaĝo kun privata plaĝo ĉe la limo inter la Adriatika Maro kaj la Venecia Laguno. La strukturo tre taŭgas ankaŭ por plenaĝuloj, tutaj familioj kaj handikapuloj. La adreso estas:

Villaggio San Paolo
Via Radaelli
Cavallino (VE)
telefono +39 041 968049

LOĜ-LANDO	ALIĜ- PERI- ODO	KOTIZO				Mem- zorg- antoj:
		Ne memzorgantoj (Aĝo je 31.03.99):				
		0-19	20-24	25-29	30 +	
Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Monako, Nederlando, Sanmarino, Svislando, Vatikano	A B C	150 170 195	180 205 230	215 245 275	260 295 330	80
Andoro, Britio, Finnlando, Malto, Norvegio, Svedio	A B C	130 150 170	160 180 200	190 215 240	225 255 285	
Aŭstralio, Ĉeĥio, Greklando, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Israelo, Japanio, Kanado, Kroatio, Novzelando, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sudkoreio, Tajvano, Usono	A B C	115 130 145	135 155 175	165 185 210	195 220 250	40
Ĉiuj ceteraj	A B C	100 115 125	120 135 150	145 160 180	170 195 215	

- Individuaj Membroj kaj Patronoj de TEJO (eblas anĝi surloke) kaj Subtenantoj de IEJ ricevos 10%-an rabaton
- La kontribuantoj al la programo ricevos rabaton laŭ interkonsento

Atentigoj

La loĝantoj de transpagipovaj landoj sendu aliĝilon kaj antaŭpagon de 60 000 ITL; la aliaj sendu nur aliĝilon se ili aliĝas poŝte, sed se ili aliĝas persone ili antaŭpagu 20 000 ITL. Ĉiukaze via aliĝo validos (kaj vi povos certi pri via loko) nur post ricevo de konfirmo. Ne pre kunportu pruvilon de la antaŭpago.

La kotizoj de ne-memzorgantoj inkluzivas programon, loĝadon en ĉambro kaj manĝadon ekde la vespermanĝo de la 19a ĝis la tagmanĝo de la 25a de aprilo. La kotizoj de memzorgantoj inkluzivas nur

programon kaj loĝadon en aparta ejo.

Oni ne redonos la antaŭpagon al malaliĝintoj; oni redonos eventualan kroman pagon, nur se la malaliĝanto informos nin antaŭ la 31a de marto 2000. Eblas transdoni sian aliĝon al ne-aliĝinto, kondiĉe ke tiu prezentu skriban ateston de la transdoninto. Ni alĝustigos la kotizon, sed ĝi ne povos malaltiĝi. Ne eblas transdono de pluraj antaŭpagoj al sama persono. Por ĉiu persono necesas aparta aliĝilo: grupa aliĝo ne estos akceptata.

REPAGO DE VOJAĜKOSTOJ!

Ni disponas je ebleco subvencii iom da vojaĝkostoj. Prioritaton havos karavanoj, sed ankaŭ unuopuloj el landoj ne tre reprezentataj ĉe nia aranĝo. Bonvolu informiĝi anticipe ĉe la IJF-administranto pri la ebleco surloke ricevi kontribuon!

Sendu

Aliĝilon al

Manuel Giorgini
S. Polo 606
IT-30125 Venezia
rete: ijf.admin@esperanto.it
telefone (nur se urĝas): +39 041
5203245

Antaŭpagon al

- Bankokonto: Gioventù
Esperantista Italiana, ABI: 3002,
CAB: 2002, c/c: 650791/19,
SWIFT: BROMIT 2V, Banca di
Roma, Filiale di Venezia, Ag. 8

- UEA-konto: ieja-z
- Per poŝtmandato adresita al
Manuel Giorgini

Temajn programkontribuojn al

Luka Bertero
Via Beaulard 47
IT-10139 Torino
rete: amuk@freemail.it
telefone: +39 011 3851209

Distrajn kaj vesperajn program- kontribuojn al

Michela Concialdi
Vic. Broch 7

IT-31025 S. Lucia di Piave (TV)
rete: m_concialdi@yahoo.com
telefone: +39 (0)339 5845500 aŭ
+39 0438 460028

Informpetojn pri TEJO kaj lingvo- politiko (prezare al tiutemaj programeroj) al

Sandra Schweder
Centra Oficejo
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
rete: tejo-oficejo@esperanto.org
telefone: +31 10 4361044


KOTIZOJ:  BAGATELAJ

VoJaĜrEpAgO



Tute Apud Venecio

ETOSO
KULTURO
TREJNADO
AMUZO
HOMAMASO



I J F

Indas

2000

aliĝi

Nomo _____
Naskiĝdato (TT.MM.JJ) _____
Sekso: Ina Malina
Adreso _____
Poŝtkodo _____ Urbo _____
Lando (esperante) _____
Telefono (internacie) _____
Retadreso _____
Mi aliĝas al la 24a IJF kiel partoprenanto tuttempa
partatempa de _____ ĝis _____
memzorganto vegetarano
Mi ŝatus loĝi kun _____
Mi bezonas invitleteron al Italio, kaj mi kunsendas
ĉiujn necesajn informojn
Mi ricevos rabaton pro TEJO-aneco
Mi mendas lokon en 1- aŭ 2- personan ĉambron
Mi antaŭpagis _____ lirojn
(banke poŝte tra UEA
Mi proponas jenan kontribuon por la tema distra
vespera programo _____
Mi akceptas ĉiujn kondiĉojn.
Dato (TT.MM.JJ) _____
Subskribo _____

Nova Sento a cura della
Gioventù Esperantista Italiana



Redazione:
Giuseppe Castelli
via Grandi 16
29100 Piacenza

Telefono: 0523 592908

Posta elettronica:
gcastelli@enjoy.it

Conto bancario intestato a
Gioventù Esperantista Italiana,
ABI 3002, CAB 2002, c/c
650791/19, SWIFT: BROMIT2V,
Banca di Roma, Filiale di
Venezia, Agenzia n. 8

Conto corrente postale
n. 11110251 intestato a
Gioventù Esperantista Italiana
presso Manuel Giorgini, S. Polo
606, 30125 Venezia

Nova Sento è su internet
all'indirizzo
<http://www.esperanto.it/iej/nova-sento/>

KVARA EŬROP-UNIA ESPERANTO-KONGRESO en OSTENDO (Belgio)

“*Ekologio, ŝlosilo por la tria jarmilo*”

De la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo 2000 (semajnfino post Pasko)

PROGRAMO

ĵaŭdo, la 27a de aprilo

15.00 ĝis 18.00 h. akceptado de la partoprenantoj en la stacidomo de Ostendo kaj en la Festpalaco
22.00 h. solena malfermo en la Festpalaco de la urbo

vendredo, la 28a de aprilo

kolokvo en la Eŭropa Parlamento (Bruselo): la eŭrodeputitoj dialogas kun la eŭropaj civitanoj

08.44 aŭ 09.44 h. forveturo el Ostendo

09.58 aŭ 10.58 h. alveno al Bruselo - gvidata vizito en la centro de Bruselo
tagmanĝo en la Eŭropa Parlamento

15.00 ĝis 16.00 h. prelegoj en la Eŭropa Parlamento

16.00 ĝis 16.15 h. paŭzo

16.15 ĝis 17.30 h. konkludoj

ekde 19.03 h. forveturo el Bruselo al Ostendo

sabato, la 29a de aprilo

09.30 h. vizito al la ekologia centro de Ostendo (bicikle aŭ buse)
libera tagmanĝo

14.00 h. vizito al la Provinca Bieno *Raversijde* (la Belgaj Reĝoj, la Atlantika Muro, bieno
de princo Karel, ruinoj de iama vilaĝo, ktp.)

dume prelegoj pri la Atlantika Muro

19.00 h. bankedo kaj amuzoj

dimanĉo, la 30a de aprilo

10.00 h. Ekumena Diservo aŭ kunveno en la nova Laika Centro
libera tagmanĝo

14.00 h.

ĝis 23.00 h. marveturo al *Niuewpoort* per la ŝipo *Sea-Star*: prelegoj pri la Norda Maro kaj pri
novaj kaj malnovaj teknologioj (sur la ŝipo).
Sur la ŝipo: muziko kaj dancoj.

lundo, la 1a de majo

09.30 h. solena fermo de la kongreso, konkludoj (Festpalaco)
posttagmeze ebleco de vizito al Bruĝo aŭ al aliaj interesaj lokoj

Ni invitas ĉiujn partopreni la 4-an Eŭrop-Unian Esperanto-Kongreson en Oostende, urbo ĉe la Norda Maro (Belgio), 27.04 ĝis 01.05.2000 (semajnfino post Pasko). Temo : Ekologio, ŝlosilo por la tria Jarmilo. Kolokvo en la Eŭropa Parlemeento kaj malkovro de la kultura centro de Bruselo; kaj en la Festpalaco de Oostende prezentado de la projekto INTERKULTURO. Mendu la aliĝilojn ĉe FEL esperanto@fel.esperanto.be aŭ ĉe FEI, Via Villoresi 38, 20143 Milano. (vidu *l'esperanto*, 7/1999).

Nome de la Belga Esperanto-Federacio, kupola organizo por la Asocio por Esperanto (Valonio), la Esperantista Brusela Grupo (Ĉefurba Regiono) kaj la Flandra Esperanto-Ligo.

Flory WITDOECKT
prezidantino de BEF kaj de FEL

Andrea CHITI-BATELLI e Umberto BROCCATELLI

**UNA PROPOSTA PER AVVICINARE L'OBBIETTIVO
«L'ESPERANTO LINGUA EUROPEA DEL 2020»**

I

Nella “Stampa” del 21 settembre scorso Gianni Vattimo, neo-europarlamentare e docente di filosofia all’Università di Torino, riferisce di una riunione tenutasi qualche giorno prima a Gargonza, in cui “un gruppo d’intellettuali”, e con essi “i ministri dell’istruzione italiano e francese e il direttore generale dell’UNESCO” hanno discusso “l’idea di costituire qualcosa come un’accademia del mondo latino che, sia con iniziative di pressione sui governi, sia con l’istituzione di borse di ricerca e di formazione per giovani studiosi, promuova la resistenza e lo sviluppo della cultura, soprattutto umanistica, dell’Europa latina contro lo strapotere tecnologico e mediatico di quella anglosassone”.

Quella illustrata da Vattimo ed altre consimili iniziative, già più volte prese soprattutto da parte francese (in Francia il governo così come varie associazioni private operano costantemente e attivamente per sostenere e incrementare la “francofonia”, al di qua e al di là dell’Atlantico, in Europa e in Africa), sono senza dubbio utili e da incoraggiare (e imitare). Ma non risolvono il problema della minaccia che l’inglese lingua franca universale di fatto costituisce per tutti gli idiomi, europei ed extra-europei, che a medio-lungo termine rischiano la progressiva estinzione: come ormai riconosce un numero sempre maggiore di linguisti (l’ultimo a nostra conoscenza è un francese che va per la maggiore, Claude Hagège).

II

Per meglio chiarire perché riteniamo ritengo che iniziative simili a quella descritta da Vattimo siano utili, ma non tocchino il nostro problema, faremo riferimento a quanto si legge, quasi contemporaneamente, nel “Corriere della Sera” del 29 settembre. Vi si constata che, contrariamente alle previsioni dei pessimisti, il numero di coloro che al mondo studiano l’italiano va crescendo: ed essi sono soprattutto giovani, e non soltanto persone con interessi musicali (l’italiano, osserviamo noi, è un po’ l’inglese della musica, e non si può esser cantante di grido senza conoscer bene la nostra lingua—come, per altro verso, non si può esser prelato d’alto rango: *noblesse oblige*).

Ora, sarebbe certo assurdo non rallegrarsi di queste buone notizie: ma chi ne traesse motivo (come chi la riferiva sembrava trarne motivo¹) per dire: “dunque questa storia della minaccia dell’inglese è una bufala” sarebbe completamente fuori strada. L’italiano potrà continuare a interessare anche quando sarà lingua morta, come interessano il greco, o il latino, o il sanscrito; ma resta il pericolo che nel giro di un secolo esso sia una lingua, se non del tutto scomparsa, certo ridotta al rango in cui oggi vivacchiano i dialetti. La politica internazionale, l’economia, la finanza, la scienza, la ricerca, la tecnologia, la comunicazione planetaria si svolgeranno sempre più in inglese, e solo in inglese: e una lingua viva - a differenza di una lingua pianificata, non materna per nessuno - è fatalmente una lingua glottofaga, quali che siano le iniziative che si prendono per sostenere il francese, l’italiano o le lingue neolatine: che, stando così le cose, sono solo iniziative che ritardano, ma non arrestano, quel progressivo *Absterben*, quella progressiva estinzione.

III

Se dunque la proposta che è stata discussa a Gargonza non risolve, nemmeno in parte, il nostro problema (anche dato e non concesso che essa vada avanti e trovi adeguata realizzazione, del che è lecito dubitare fortemente), essa invece può fornir lo spunto per un’iniziativa più seriamente voluta e più direttamente finalizzata ai nostri obiettivi.

Un gruppo sufficientemente autorevole di intellettuali europei dovrebbe, con la partecipazione delle associazioni esperantiste del vecchio continente, chiedere alle autorità competenti dell’Unione Europea, e in particolare al Parlamento Europeo e alla Commissione, di istituire una conferenza permanente - appunto intereuropea - in cui linguisti, ministri dell’educazione, esperti governativi e comunitari, rappresentanti di organizzazioni non governative a vario titolo interessate agli aspetti politici dei problemi linguistici, studino, confrontando le loro opinioni, i rischi delle lingue europee e i problemi della comunicazione europea e mondiale.

Tale conferenza potrebbe forse riunirsi sempre nella stessa città (di preferenza francese), in modo

da esser definita da questa ("la conferenza di Avignone" o "di Montpellier" ecc.), riunirsi ogni due o tre anni, esser introdotta da due o tre relazioni di rappresentanti del comitato promotore, che illustrino i diversi punti di vista e le diverse soluzioni proposte, ed esser aperta a tutte le voci e a tutti i suggerimenti.

Non è infatti immaginabile - dato il peso, purtroppo scarso, delle organizzazioni esperantiste - che il *Leitmotiv* di una simile conferenza possa essere, sin dall'inizio, l'obiettivo di una lingua pianificata, sola soluzione reale, a nostro avviso, per prevenire i rischi di scomparsa delle nostre lingue come per risolver nel modo più semplice e razionale il problema della comunicazione europea (e domani planetaria). Ma è lecito confidare che, se la conferenza acquisterà importanza e autorità, e vedrà crescere il numero di partecipanti scientificamente e politicamente qualificati, le nostre idee possano a poco a poco affermarsi, e che in particolare possa farsi strada il *préalable* politico da noi sempre sostenuto: perché ci sia una lingua franca europea pianificata occorre che prima si dia vita a un vero e proprio Stato federale europeo. E in proposito la progettata Conferenza potrebbe dar un impulso non indifferente, aggiungendo questo argomento culturale a quelli già ricordati - economico, politico, militare - che parlano in favore di un'Europa-Stato, e un'Europa stato d'animo².

IV

